

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15.— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

H. B. KVĚTOŇ:

## S M E T A N A

Kiel inter Francoj Hector Berlioz, inter Germanoj Richard Wagner kaj Franz Liszt, tiel inter Ĉeĥoslovakoj (Boĥemoj) Bedřich (Frederiko) Smetana (2. 3. 1824 Litomyšl — 12. 5. 1884 Praha) entreprenis grandan kaj energian batalon por la moderna muziko. Kaj tiu ĉi filo de malgranda kaj subpremata nacio ne estis mapli granda geniulo ol tiuj feliĉaj anoj de grandaj kaj potencaj nacioj. Se li estis malpli konata ol ili, la sola kaŭzo estis la sorto de mallibera nacio, la malŝato de grandaj kaj liberaj nacioj al la malgrandaj kaj malliberaj, la malŝato de la mondo al la kulturoj de neregantaj gentoj.

Smetana en la muziko, kiel Mácha en la poezio, Mánes en la pentroarto, Dobrovský kaj Palacký en la sciencoj, la unua montris, ke la vekiganta nacio, tri jarcentojn elĉerpanta siajn fortojn en la batalo por sia liberigo, ne estas kultura parazito de la nacioj posedantaj la neinterrompitajn tradiciojn, sed ke ĝi estas nacio kapabla memstare kreadi kulturajn valorojn, sendepende solvadi aktualajn problemojn kaj fari verkojn kompareblajn kun tiuj de la grandaj nacioj. Hodiaŭ, kiam la ĉeĥoslovaka nacio reakiris sian liberecon kaj denove decidas pri siaj sortoj, oni tion klare vidas kaj bontrovas, sed en la tempo de la mallibereco eĉ tiuj ĉi signoj de la propra kultura vivado estis subpremataj kaj preterrigardataj.

Smetana estas kreinto de la ĉeĥa moderna muziko, li estas ĉeĥa nacia muzikisto kaj komponisto, sed lia muziko ha-

vas valorojn kaj kvalitojn de granda, vera arto, kapabla por sia propra vivo, de la arto leviĝanta super la limojn de loka signifo. En la periodo de sia plej granda krea forto Smetana rigardis kiel sian taskon krei ĉeĥan modernan operon, ĉeĥan laŭ spirito kaj modernan laŭ stilo, ĉar sole tiel ĝi povis havi plenan kulturen valoron kaj kapablon por la plua evoluo, sed la nacia karaktero de liaj verkoj estas en plena konsento kun la postuloj de internacia arto, ili estas ĉeĥaj laŭ sia naturo, sen trudemacia tendenco.

Krom pure arta trajto kaj nacia karaktero la verkoj de Smetana havas gravan idean bazon. Por Smetana la muziko ne estis celo, li neniel celis fari belajn kaj plaĉantajn verkojn, por li la muziko estis sole formo kaj esprimo de grandaj kaj profundaj ideoj, li celis fari verkojn, kiuj servus al la pli altaj taskoj de la vivo; laŭ Smetana la arto ne estas amuzajo nek ĝuajo, sed grava socia funkcio, kaj li penis, ke lia muziko estu trapenetrita de viva ideo, ke ĝi estu same utila kiel ĉiu celhava agado de homo. Per siaj komponaĵoj Smetana brile montris, ke la muzika arto povas esti portanto de naciaj evoluo kaj progreso, ke ĝi povas levi la tutan spiritan kulturon de nacio. En la historio de artoj de ĉiuj nacioj estas nemultaj artistoj, kiuj kun alte artaj kvalitoj perfekte kunigis ideajn tendencojn kiel Smetana.

Alia grava trajto de la muzika kreado de Smetana estas lia batalo por la vereco kaj natureco kiel en la vivo tiel en la arto.

En tiu direkto li staras ĉe flanko de la plej grandaj artistoj, kiuj en la deknaŭa jarcento batalis por arta realismo kaj inter kiuj Wagner kaj Smetana, unu sendependa de alia, estas certe la plej grandaj muzikaj dramverkistoj de la deknaŭa jarcento.

Por la muziko de Smetana estas tre karakteriza ankaŭ lia profunda sento por kolektivo, tiu sento, kiu havigas al liaj verkoj kuraĝan karakteron socialan; ne individuoj, sed la popolo estas objekto kaj subjekto de liaj komponaĵoj; kaj la kolektivo, pri kiu li rakontas, al kiu li sin direktas kaj por kiu li laboras estas nacio. Nacia socio estas ĉe li kolektiva medio, per kiu li dediĉas siajn komponaĵojn al la homaro, lia naciismo estas lia vojo al internaciismo de la arto.

La karaktero de la muziko de Smetana montriĝas plej bone en liaj komikaj operoj. En ili li atingas la plej bonajn komikajn efektojn per muzika riĉeco de orkestro kaj per realisma deklamo de vortoj; ĉiu vorto havanta sian melodion posedas ĝin ankaŭ en la muziko.

Liaj muzik-dramaj komponaĵoj, liaj ok nemorteblaj operoj, estas brila vico da verkoj riĉe diversaj kaj tamen idee unuecaj. Lia unua opero „Brandeburganoj en Bohemujo“ (Braniboři v Čechách) — ludita la unuan fojon en la komenco de la jaro 1866a en Praha — montras lian grandan amon al malŝatataj rondoj de urbaj malriĉuloj. Lia dua opero „Prodaná nevěsta“ (Vendita fianĉino) — ludita en majo 1866 — ĉarme pentras la vivon de ĉeĥaj vilaĝanoj. La tria opero „Dalibor“ (nomo de unu ĉeĥa malgranda nobelo) muzike esprimas noblan kuraĝon necedantan eĉ antaŭ la reĝa potenco kaj savan forton de virina amo. La kvara opero „Libuše“ (nomo de la ĉeĥa princino-regantino, kiu laŭ famo fondis la urbon Praha) estas ideala esprimo de la plej supera sopiro je la efektivigo de la idealo de libereco. La kvina opero „Du vidvinoj“ (Dvě vdovy) kaj la sesa „Kiso“ (Hubička) estas alitipaj komikaj operoj de la plej delikata sento. Ankaŭ la sepa, lia plej bela opero „Sekreto“ (Tajemství) estas komika, deŝananta per alia nova muzika tono la naturon de ĉeĥa malgranda burĝaro. Fine la oka opero „Čertova stěna“ (Roko de diablo) estas komika-romantika en spirito de ĉeĥaj humorplenaj fabeloj. Ĉiuj el tiuj ĉi komponaĵoj estas kreitaj el trezoro de

granda amo de Smetana al la nacio, ĉiuj estas belega apoteozo al sanoplena popola vivo. Speciale liaj komikaj operoj estas la unikaĵoj en la tutmonda literaturo de tiu ĉi speco en la tempo post Mozart. „Vendita fianĉino“ kaj „Sekreto“ estas idealaj modernaj komikaj operoj perfekte solvantaj la problemon pri nacia muziko. La merito de Smetana estas, ke li faris komikan operon egalvalora al la serioza.

Alia grandega verko, al kiu similan posedas neniu alia nacio, estas lia ciklo de simfoniaj poemoj „Mia patrujo“ (Má vlast), en kiu Smetana muzike staras plej alte, en kiu alten levigis lia idea grandeco kaj nobla arteco. En ses belegaj komponaĵoj de tiu ĉi ciklo (Vyšehrad, Vltava, Sárka, Z českých luhů a hájů, Tábor, Blaník) Smetana gloras la ĉeĥoslovakajn landon kaj popolon, pasintan kaj estantan tempojn de la nacio kaj ĝiajn esperojn je feliĉoplena venonta tempo; sole per orkestro li kreas klarajn kaj firmajn bildojn respondantajn precize al certaj poeziaj ideoj. Ciklo da muzikaj poemoj esprimantaj certan poezian ideon, estas zenito de liaj instrumentaj komponaĵoj.

Pro sia arteca valoro al „Mia patrujo“ aliĝas lia belega kordinstrumenta kvarteto „El mia vivo“ (Z mého života), kiu estas vera muzika aŭtobiografio de Smetana; en ĝi Smetana escepte turnas sin al sia interno, al la rememoroj je sia vivo, komencante de gajaj infanaj jaroj trans la epoko de faroplenaj, en laboro feliĉaj viraj jaroj ĝis la katastrofaj momentoj de la surdiĝo.

El la entuziasmo de Smetana por la moderna tendenco de Liszt al muziko kun poezia programo naskiĝis dum la restado de Smetana en Svedujo (1856—1861) tri grandaj simfoniaj poemoj, tiame tute nova formo de orkestra muziko: la unua „Richardo III.“ (Richard III.) estas komponita al temo de la tragedio de Shakespeare, la dua „Tendaro de Waldstein“ (Valdštyňův tábor) al la unua parto de la trilogio de Schiller, la tria „Hakon Jarlo“ al temo el svedaj fabeloj. Ili estas valoraj komponaĵoj, per kiuj la unuan fojon ĉeĥa komponisto eniris la tutmondan muzikon.

Krom tiuj ĉi grandaj komponaĵoj Smetana verkis vicon da ĉiuspecaj malpli grandaj, sed valoraj verkoj: Fundamentaj liaj komponaĵoj por piano estas „Ĉeĥaj dancoj“ (České tance), malnovaj ĉeĥaj popolaj dan-

coj eminente refaritaj en alta arta stilo. Aliaj komponaĵoj por piano estas „Koncertaj fantazioj“ laŭ ĉeĥaj naciaj kantoj kaj poeziaj bildoj „Revoj“ (Sny). En fremdlando li rememoras sian patrujon kaj sian amon al ĉeĥaj dancoj en komponaĵo por piano „Rememoroj je Bohemujo en la formo de polko“ (Vzpomínky na Čechy v podobě polky). Sian adiaŭon al la gastema Svedujo li reproduktis per koncerta piana komponaĵo „Sur la bordo de maro“ (Na břehu mořském). Por piano kaj violono Smetana komponis du solajn duetojn sub la titolo „El la patrolando“ (Z domoviny). El lia dua periodo de kreado devenas la plej belaj verkoj de la ĉeĥa ĥora literaturo: viraj horoj „Renegato“ (Odrodilec), „Tri rajdantoj“ (Tři jezdcí), esprimanta la ĉagrenon de ĉeĥa popolo post aŭtodafeo de Hus, „Kampista kanto“ (Rolnická), amoplenta apoteozo al la laboro de vilaĝanoj, „Solena ĥoro“ (Slavnostní sbor) ĉe la inaŭguro de rememortabulo al ĉeĥa ĵurnalisto Havlíček-Borovský, „Kanto sur maro“ (Píseň na moři), priskribanta belajojn de la marveturo de Smetana, „Dediĉo“ (Věno) kaj „Preĝo“ (Modlitba), unu sola verko de Smetana kun religia tono. Li verkis ankaŭ tri malgrandajn, sed ĉarmajn ĥorojn por virinoj: „Mia stelo“ (Má hvězda), „Subiro de la suno“ (Západ slunce) kaj „Alflugis la hirundoj“ (Přiletěly vlaškovky). Komuna ĥoro estas malgranda kantato el kvar tezoj kun akompano de orkestro „Ĉeĥa kanto“ (Česká píseň), tre populara glorigo de ĉeĥa kantemo. En fako de arta kanto Smetana komponis sole kvin poemojn el „Vesperaj kantoj“ (Večerní písně) de V. Hálek, kvin juvelojn de ĉeĥa kanta literaturo. Neniel malgranda estas vico de liaj danmuzikaĵoj kaj okazaj komponaĵoj, kiujn li verkadis jam de la oka jaro de sia aĝo (de 1832).

Ĉiuj ĉi verkoj estas produktaĵoj de granda idea riĉeco, senta varmeco, ili ĉiuj estas profunde veraj, elkreskitaj el la interna travivo de la aŭtoro, ili ĉiuj estas komponitaj kun la plej granda artistaj konscienco kaj kapablo, kun uzo de ĉiuj tre grandaj artistaj fortoj. El ĉiuj parolas al oni grandaj spirito kaj koro, genia artisto kaj ideala homo.

La komponaĵoj de Smetana ne estas teknike facilaj kaj popolaj, sed tre riĉaj, ili estas muzike komplikitaj kaj alte artaj:

Smetana tuj en siaj unuaj komponaĵoj estis tre kuraĝa elserĉante agordojn kaj kunigante voĉojn, en tiu kuraĝo superis lin neniu alia tiama komponisto, eĉ ne Wagner.

Smetana estis ne sole genia komponisto, sed ankaŭ granda muzikisto-virtuozo, muzik-instruisto, muzik-kritikisto, dirigento, organizanto de la muzika vivo. Laŭ lia opiniaro pri arto ne sufiĉas krei artajn verkojn, sed la artisto devas formi artistan vivon, li devas en la socio batali por sia arto kaj por ĝiaj ideoj. Li mem koncertis kiel pianvirtuozo, li havis en Praha muzikan lernejon, kvin jarojn (1856—1861) li estis kapelestro de la filharmonia societo en sveda marborda urbo Göteborg, ok jarojn (1866—1874, ĝis kiam li surdiĝis) estis dirigento de orkestro en nacia teatro de Praha, li en la ĵurnalo „Národní listy“ (Nacia ĵurnalo) kritikis tiamajn muzikon kaj muzikan vivon, li organizis konstantajn (abonajn) koncertojn en Praha kaj fondis ĉeĥan operon kiel institucio levinte la ĉeĥan teatron al eminenta artista institucio, li gvidis organizaĵojn de muzikistoj kaj artistoj en „Artista klubo de Praha“ (Umělecká beseda) ktp. Mallonge, li energie kaj persiste laboris por plibonigi la muzikan vivon kaj la muzikon mem. Sed li batalis ne sole por pli grandaj artaj valoroj, sed eĉ por la pli grandaj valoroj de la vivo. La plibonigo de la tuta vivo estis lia celo kaj altigo de la muziko sole rimedo por tio. Por siaj ideoj Smetana batalis malcedeme kontraŭ multaj kaj potencaj kontraŭstarantoj, kiuj tiel malbone komprenis lin, ke ili riproĉis al li, la plej nacia artisto, fremdecon, internaciecon, eĉ senaciecon! Sed li ne cedis kaj — venkis.

Smetana estas majstro, granda majstro de la muziko, sed la majstreco ne estas lia celo, ĝi estas la rimedo por klare kaj potence esprimi sian ideon per muzika verko. Tiu ideo estas ĉeĥa, sed la arta valoro de ĝia esprimo estas tutmonda. Tial, Smetana kiel Hus kaj Komenský reprezentas antaŭ la mondo ĉeĥoslovakajn ideon, spiriton kaj senton, ĉeĥoslovakajn partoprenon en la kultura evoluo de la homaro, dokumentas la mondan nivelon de la ĉeĥoslovaka kulturo. Lia laboro kiel tiu de Hus kaj Komenský ne apartenas sole al la ĉeĥoslovaka historio, sed al la tutmonda. Tial prave la tuta mondo rememoras la centan datrevenon de la naskiĝo de granda filo de malgranda nacio.

Dr. W. KIENZL, WIEN:

## LA MUZIKO DE SMETANA

Impresoj de germana kritikisto.

La komponaĵoj de Smetana entuziasmigis min de la unua momento, per sia freŝeco kaj originaleco, el kiu fontis lia nacia melodieco, kiu faris lin ĉeĥa Schubert. Lia originala, senpere el la koro fontanta muziko min ĉarmis, kiel kreaĵo de la naturo.

La nacia elemento en la muziko de Smetana estas plej forte videbla en liaj operoj; kiel muzikisto de pli alta karaktero li montras sin precipe en sia belega simfonia poemo, en la 6parta ciklo „Mia patrolando“, atestanta pri lia varma amo al la patrujo. Estas analogia la okazo de Weber, kiu en la „Sorĉpafisto“, per siaj patriotaj ĥorkantoj el la libro „Liro kaj glavo“ de Körner kaj per siaj kantoj montiris sin kiel viro de sia nacio; en siaj sonatoj, piano-komponaĵoj kaj koncertoj kiel brila salona komponisto, kiu ne forgesas pri la bongusto de nobla societo. Kiel laboranto en virtuozastilo, Smetana prezentas sin precipe en koncertaj pianaj komponaĵoj „Les rêves“, en „Kvar salonaj polkoj“ kaj en tiuj 10 ĉarmaj „Ĉeĥaj dancoj“, kiuj ne devus manki en la repertuaro de kiuj ajn pianisto. La „Vendita Fianĉino“, kiun mi aŭdis la unuan fojon en 1889 en la Nacia Teatro de Praha, kie ĝi estis ludata ĝis nun certe pli ol 1000foje, konkiris jam antaŭ longe la tutan mondon. Tiun ĉi operon oni povas nomi la ĉeĥa „Sorĉpafisto“, ĉar ĉiam ĝi valoros kiel la plej perfekta esprimo de la ĉeĥa nacia spirito.

La uverturo al la „Vendita Fianĉino“, fajreranta per temperamento, estas majstra verko, kiun oni sen embarasoj povas meti apud la uverturo al la „Edziĝo de Figaro“ de Mozart. Ankoraŭ hodiaŭ mi estas fiera pri tio, ke estis mi, kies klopodoj influis la unuan prezentadon en Germanio (Dresden).

La saman famon meritis la „Kiso“, eksterordinare melodia, ĉarma opero, samvalora al la antaŭa. Ankaŭ la „Sekreto“ kaj „Du Vidvinoj“ estas riĉaj je beleco.

Plena de nobla melodieco estas la opero „Dalibor“, rememoriganta per sia temo pri „Fidelio“, kaj la opero „Libuŝe“. Smetana uzis en siaj operoj sole naciajn temojn, same kiel en la simfonia ciklo „Mia patrolando“. En tiuj ĉi programaj verkoj — kiuj estas frukto de la impresoj, kaŭzita ĉe la

komponinto per la „Simfoniaj poemoj“ de Liszt — Smetana respektas la bonege konstruitan kaj klare dispartigitan formon, multe pli ol Liszt, inklinita pli al rapsodeco. Eĉ ne sciante la poetan temon, oni plene povas ĝui la simfoniaĵojn de Smetana sole kiel belan muzikon, sen perdi ion ajn. En iuj el tiuj ĉi muzikaj poemoj vidiĝas forta traĵeto de grandeco, kiun bone servis la riĉa fantazio de la komponinto, plej videbla en „Vltava“, „Tábor“ kaj „Blaník“. Ankaŭ liaj simfoniaj poemoj ĉerpas el du, ŝajne diversaj fontoj — unu el ili fontas el la arto de Wagner kaj Liszt, la alia fontas el la granda trezoro de popola kanto — jen levigante al la heroa ekstazo, jen fandiĝante en varmaj, delikataj, sentoplenaj tonoj, ĉio portata de riĉe floranta kompreno por melodio, ĉio efektive travivita kaj tial ĉio tiel vera, efektiva kaj efika.

Tiuj ĉi proprecoj klare vidiĝas ankaŭ en la kameraj komponaĵoj de Smetana, en lia brilega „G-moll piana trio“, devenanta el la frua tempo de lia kreado, en liaj plej bonaj duetoj por piano kaj violono „El mia patrolando“ kaj precipe en lia fama E-moll arĉo-kvarteto, en kies tonoj li rakontas kortuŝe pri sia sorto ĝis la plena surdiĝo — lia tragika sorto Beethoven'a. En la stato de plena surdeco, kiu enpelis la muzikartiston, en la fino de lia vivo dediĉita al la batalo pri la plej alta arto, en la ĉirkaŭprenon de la frenezeco, li komponis la jus diritajn ses komponaĵojn, kiujn neniam li aŭdis.

Sole el la pura kaj delikatsenta koro povis fontii tiel pura arto kiel tiu de Smetana. Mi havis ja sole unufoje la feliĉon persone renkonti lin, sed ĝi signifis multon. Ĝi okazis unu kaj duonan jaron antaŭ lia morto, en oktobro 1882. Neniam mi forgesos tiun vesperon, kiun mi pasigis kun li en silenta angulo de iu gastejeto en Praha. En tiuj kelkaj horoj mi konatiĝis kun lia ora koro kaj kun lia gajhumoro, spitanta ĉiun malfeliĉon, kaj kun la multflanka klareco de tiu ĉi eminenta viro, kaj plene klara fariĝis al mi lia interna rilato de aĵoj artaj al la homaj. Montriĝis al mi tiam tuta homo, homo, en kiu realiĝis feliĉa sintezo de infana simpleco kaj de delikata anima kul-

turo, homo de forta nacia sentado kaj de internacia horizonto. Imponis al mi la maniero, en kiu Smetana portis sian teruran sorton. Kiam li rakontis al mi la historion de sia malfeliĉo (li surdiĝis subite — en iu nokto li subite komencis aŭdi seninterrompe unusolan altan tonon, kvarfoje strekitan e, kiun li ankaŭ tiel artoplene eternigis en la finalo de sia E-mol kvarteto kaj kiu glitis en lian vivoĝojon subite kiel fulmo), ŝanĝiĝis la esprimo de lia afabla vizaĝo. Ni interkonsentadis tiamaniere, ke miajn respondojn kaj demandojn mi skribis, li mem parolis facile kaj flue. En ideoj pri la arto ni bone komprenis unu la alian. Li

rakontis al mi multon el sia interesa vivo de artisto kaj pri la maniero de sia kreado. Inter alio li menciis, ke li kapablas komponi sole en la stato de la plej alta inspiro, ĉar alie la muziknotaro aperas al li, surdulo, tute senviva, kiel matematika formularo. Sed ekprenante la plumon por fiksi siajn inspirojn, li troviĝas en la stato de plena miriga klareco. Kaj tia ankaŭ radias el liaj verkoj.

Troviĝas en ili nenio elkombinita, problema, nenio afektita. Ĉio estas travivita kaj necesa: „Und wie er musst', so kont' er 's.

*El la ĉeĥa Tribuna trad. Rud. Hromada.*

JAN HAVRAN:

## J. S. MACHAR

(Naskiĝis la 29an de februaro 1864 en Kolin en Bohemio)

Tiu ĉi poeto estas verkisto, kiu plej multe el ĉiuj samtempuloj influis je la ĉeĥa generacio floranta kaj maturiĝanta en la jaroj 1895—1910. Liaj unuaj versoj estis skeptikismaj kaj satiraj. La prudenta intelekto vidis la vantecon de granda ago kaj hipokritecon de la morala prediko, sed la kompatema koro sopiris pri realigo de bona faro. El tio rezultis poemoj, kiuj iam estas ĉarmaj enkorpiĝoj de la homa kompato instigita kaj argumentita pro la homa saĝa kompreno de la racia sinsekvo de aferoj kaj de ilia malcerta finalo. Ofte ili estas satiraj, sed la akra kaj kuraĝa atako neniam forgesas sian reformeman celon. Tiaj estas liaj unuaj libroj „Confiteor“, „Sen titolo“, „Kvar libroj de sonetoj“. Ofte la poeta kompreno de tragika sorto de malforta individuo koncernis tragikan sorton de virina amo. Sed la koro de la poeto ne estis sole kompatema, ĝi estis ankaŭ aŭdaca kaj kredema. Dum maturiĝadis la homo kaj la poeto, kreskis ankaŭ lia kredo, ke la stato de homaro estas plibonigebla laŭ la metodoj kaj leĝoj trovitaj kaj trovotaj de la homa intelekto, kaj ke estas devo batali por tia celo, de intelekto fiksita per ĉiuj fortoj de la animo. Kaj lia verko ĉiam pli estiĝadis batalo por la racionalisma idealo, kiun kreis al li lia sagaca intelekto. Ĝi estis idealo, de homo, al kiu ĉiuj dioj mortis, sed kiu trovas sencon por vivi en si mem, en la tuthomara solidara bezono kaj ĝojo vivi. Bone komprenite: honeste vivi! Al tiu racionalisma idealo servas ĉiam pli la tuta verkado de la poeto. Idealon de tia, laŭ li

sole ĝusta, kompreno de la homaraj rilatoj li trovas en la antikva vivo kaj en la kristanismo li vidas malutilan epizodon de la evoluo de l' homaro. Tial li multan klopodon oferis al batalo kontraŭ praktikaj aplikoj de katolika eklezio. En proza libro „Romo“ li sciis kun malofta konvinkemo travestii kaj persifli la materiajn kristanajn memorindaĵojn en la Eterna Urbo. Simile konvinke sciis lia satiro trakti la aplikojn de la kristanismo praktikatajn de la Aŭstria monarkia registaro. Poezie li montris la kontraŭon de la antikva „sana kaj evoluo-pova“ kompreno de la vivo kaj de la kristana „senfrukta kaj malutila“ en longa vico de libroj kune titolitaj „Tra konscienco de jarcentoj“, en kiuj li kondukas la leganton de antiko ĝis Napoleona epoko kaj en historiaj anekdotaj okazintaĵoj li montras la malkonsenton de la antikva kaj kristana mondkomprenoj kaj la preferon al la unua. En kelkaj el tiu ĉi poemoj li alvenas al nivelo de la plej alta poezio eŭropa. Spite ilia tendencemo influo de verkaro de Machar estis tre granda. Liaj poemoj kaj prozoj fariĝis poezia konvinkanto de la koro pri tio, kion la cerbo ekonadis kaj kion volis kredi la ĉeĥa volo, lia menso estis dum certa tempo tipa ĉeĥa menso kaj daŭre estos verkoj de Machar dokumento de la sentima, klara, realama, senluziema rigardo, per kiu sciis ĉeĥa intelekto dum transiro de la deknaŭa al la dudeka jarcento vidi la eternajn problemojn de rilato inter absoluto kaj relativo.

MILOŠ LUKAŠ:

## ANTONÍN SOVA

La reveman lirikiston *Antonín Sova* (\*26. II. 1864 en la subbohema urbeto Pácvov), samaĝulon de Machar, komence influis la franca Parnaso kaj parte ankaŭ Jar. Vrchlický; baldaŭ li transiris al la realistoj, sed en sia lasta periodo li iĝis unu el la plej eminentaj ĉeĥaj reprezentantoj de impresionismo kaj simbolismo. Paralele kun la idea evoluo esence sin ŝanĝis lia poezia formo: Sova uzas nun ritmon liberan, kiu — kvankam ne estante arbitra, sed ĉiam mirinde melodia — tamen akre kontrastas kontraŭ la zorga reguleco de liaj iamaj versoj.

Eksterordinara talento psikologia vekis en Sova profundan komprenon socialan, el kiu lastfine rezultas liaj protestoj kontraŭ ĉiuspeca perforto aŭ subpremado; ĝi speguliĝas same en multaj liaj poemoj kiel en lia romana kaj rakonta prozo. Delikata sentemo kaj sincera kompatemo karakterizas la noblan poeton, kiu estas ne nur fervora patrioto firme kredanta je pli bona estonteco de sia amata nacio, sed ankaŭ nelacigebla predikanto de vera frateco tuthomara. Kaj precipe tiu ĉi cirkonstanco pliproksimigas lin al ni, la disĉiploj de Zamenhof.



ANTONÍN SOVA:

## PASTORALO

Ho, Ondoĵ de la Nokto, bruu nur,  
malriĉan bordon batu via kur';  
mi lasos pensojn flugi kun la vent'  
kaj mem senmova restos en silent'.

Sur la Paŝteĵ' de Revoj en montar'  
embuskas nekonata ĉasistar':  
revenos multaj kun danĝera vund'  
kaj multajn eĉ englutos la profund'.

Post kiam estingiĝos nokta lamp',  
mi hundon sendos al la paŝta kamp',  
kaj ĝi, la nigra Hundo de Malĝoj',  
repelos ilin al la hejma voj'...

Tradukis M. Lukáš.

J. S. MACHAR:

## HANNIBAL ANTE PORTAS

Li staris antaŭ la pordegoj urbaj...  
De sur la turoj, de Kapitolio  
videbla estis la tendaro hela  
kaj fumo de la fajroj.

Ĉiuhore  
la timo kreskis, kaj la nokto ŝajnis  
pro tio nur venadi en la urbon,  
por ke ĝi la teruron pligrandigu.  
La dioj mem silentis; tamen ofte  
vidigis sin ilia malfavoro:  
jen sange ŝvitis la statuo Marsa,  
sur urba strato jen aperis lupo,  
noktuo jen ululis super Forum,  
hepato bova sub tranĉil' de pastro  
sin montris sulkoplana kaj misforma...  
Silento antaŭtandra sur la stratoj,  
en domoj timo nur kaj maltrankvilo...

Publika vivo marŝis sian vojon:  
kunvenis la senato, kiel ĉiam  
pretoro juĝis sur kurula seĝo,  
kaj la kvestoro en Ostion iris  
por elŝipigi vinon kaj tritikon.

Aŭkcio jen okazis. la kampo  
vendota estis. Venis kelkaj homoj,  
sed tiujn logis sole scivoleco,  
ne aĉetemo. Oni jam anoncis  
la prezon. Post momenta silentado  
elpaŝis viro — lian nomon, genton  
neniu konas; li Romano estis,  
da kiaj tiam centoj en la urbo  
laŭ sama sorto vivis kaj mortadis —  
kaj tia viro volis do aĉeti  
la kampon...

Tuj ekregis granda miro,  
konsterno falis sur la ĉeestantojn,  
de ĉiuj flankoj oni jene vokis:

„Vi malsaĝulo, kion vi aĉetas?“

„Malsana eble estas via cerbo?“

„Pro tia patro filoj devos plori!“

Parolis tiel ĉiuj. Sed la viro  
rigardis ilin fikse kaj prudente.

Jen nova krio:

„Ĉu vi do ne scias,  
ke Hannibal nun staras sur la kampo,  
li, kiu la armeon roman venkis  
kaj baldaŭ eĉ detruos nian urbon?!“

— Ja spite tial, ĉar li tie staras,  
kaj ĉar mi kredas, ke mi propramane  
kulturos ĝin, aĉetas mi la kampon! —

Nenion plu ni scias pri la viro,  
nur ke la kampon fakte li kulturis.  
Kaj kvankam ion mi elpensi povus,  
mi ne kuraĝas. Ĉe aŭtor' antikva  
mi trovis tiun simplan arabeskon  
skribitan por amuzo de leganto;  
nun mi komprenas, kial Romo staris  
post Trebia kaj Trasimeno, Cannae —  
komprenas mi, pro kio, se jam devis  
el tiuj du rivaloj unu fali,  
ne povis fali Romo. Romo estis  
el fero. Kaj Kartago nur el ŝtono.

Tradukis M. Lukáš.

## ESPERANTA MOVADO

### LA XVI. EN WIEN

Aperis dua bulteno, datita la 25 Februaro, kiun ni ne ricevis. Sed al ĈAE ĝi venis kun trisemajna malfruigo. — La L. K. K. sekvas tiun ĉi jaron alian metodon, nereklamante pere de esp. gazetoj, sed sendante la invitilojn direkte, laŭ la adresoj konataj, unuavice al la partoprenintoj de la Nürnberga kongreso. Ĉu tiamaniere ĉiuj personoj emaj iri al Wien estos trafitaj, ni dubas, sed la LKK estas kontenta pri la rezultato. *Ĝis la 15. Februaro aliĝis pli ol 1000 p.* Sufiĉa nombro da taŭgaj, puraj ĉambroj estas garantiata.

*Kosto de vivado en Wien.* Vojaĝanto modesta kaj ŝparema bezonos 12—20 Kĉ. La duobla sumo ebligas ĉiurilatan plibonigon kaj la sumo 50—70 Kĉ po tago kaj persono garantias jam luksan restadon.

Ĉiuj laboroj preparaj progresas vere kontentige kaj donas ankaŭ al la komitatanoj mem la dezirindan, daŭre freŝan laboremon.

Ĉar post la fino de marto la kotizo plialtiĝos, sendu *aliĝon tuj!*

Jus ni vidis hazarde la trian bultenon, per kiu ni sciiĝas, ke *ĝis la 15. Marto aliĝis 2.000 kongresanoj el 27 landoj.*

La kotizo ne estos altigita jam la 31. Marto, sed por aliĝoj alvenontaj *post* la 31. Majo.

Kiel kongresa teatraĵo estis elektita gaja tipe Wien'a sorĉfabelo de Raimund: „Der Verschwen-der“ (la malŝparulo).

### GRAVA INFORMO POR KONGRESANOJ

Ĉedok, Ĉeĥoslovaka Vojaĝa Oficejo en Praha informis nin, ke ĝi intencas aranĝi okaze de la Wiena kongreso specialan vagonaron Praha-Wien, event. Cheb (Eger) Praha-Wien kaj Dĉin-Podmokly (Tetschen-Bodenbach) Praha-Wien, kies partoprenantoj havos rabaton fervojan kaj pasportan. Detaloj venonte. Tiun ĉi vagonaron povas do uzi ne nur kongresanoj el ĈSR, sed ankaŭ ĉiuj samideanoj el norda kaj nordorienta Eŭropo, kiuj, veturante tra Ĉeĥoslovakio, povas tiamaniere malpligrandigi siajn elspezojn vojaĝajn kaj viziti ĉe tio la urbon de la XIII. kongreso.

### LA IX. KATOLIKA KONGRESO EN WIEN

Laŭ informo, kiun ni ricevis, ĝi okazos la 6—9 Aŭgusto. Speciala kotizo ne estas postulata. Kondiĉo estas sole aliĝi al la XVI. Tamen sendu specialan aliĝon al S-ro Viktor K a s m a d e r, sekr. en Wien 18. Herbeckstr. 92/6, kiu donos ĉiujn aliajn informojn

### 2a RADIOTELEFONA PAROLADO EN PRAHA

okazis la 2 Marto el stacio Kbely apud Praha. S-ro Pitlik parolis pri Bedřich S m e t a n a, kreinto de ĉeĥa opero. Sekve de neperfekta aranĝo de provizora stacio en Ĉ. Esp.-Instituto, la multenombre kunvenintaj samideanoj nur malbone aŭdis. Laŭ informo de S-ro Pitlik la parolado estis aŭskultata kun bona rezultato en diversaj lokoj. La parolado estis aŭskultata de sam-oj en Dresden, Newcastle, München, Liberec, K. Vary, Budějovice, Olomouc, Plzeň.

### 3a PAROLADO RADIOTELEFONA EN PRAHA

okazis la 17 Marto. El Kbely S-ro Pitlik parolis pri Foiro de Praha, samtempe okazanta. Samideanoj de Praha havis eblecon aŭskulti ĝin en la provizora stacio starigita sur la Foirojo (pavilono C). Bonega aparato akcepta ebligis al ni aŭdi klare ne nur la paroladon esperantan, sed ankaŭ la antaŭan koncerton de naciaj kantoj kaj modernaj danĉmelodioj kaj fragmentojn de diversaj koncertoj el Berlin, London, Birmigham k. a.

### 4a PAROLADO EN PRAHA

okazis la 24 Marto je la 20. 50. S-ro Prof. Ing. G. Scholze, estro de Esperanto-Fako de la Foiro de Reichenberg kaj prez. de Germana Esperanto-Ligo en ĈSR parolis pri Graveco de la Ĉeĥoslovaka Respubliko ĉe la ekonomia rekonstruo de Eŭropo.

## LA II. ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO EN LIBEREC

*Pentekoste 7—9 Junio 1924.*

La Loka Kongresa Komitato sendis al ni longan liston de siaj membroj, el kiu ni citas: Prez. Prof. Ing. G. Scholze, vicprez. Jan Haase, sekr. Karl Schüller. Adreso por aliĝoj: ĉe la prezidanto, Liberec, Klotildenstr. 6. Vidu almetitan aliĝilon. Kotizo 15 Kĉ.

#### Provizora programo:

Sabate posttagmeze: akceptado,  
vespere: interkonatiĝa vespero kun koncerto.

Dimanĉe: matene: oficiala malfermo,  
tgm.: komuna tagmanĝo,  
ptgm.: 1-a laborkunsido. Faka kunsido de UEA,  
vespere: festvespero.

Lunde matene: 2a laborkunsido. Kunsido de UEA-junulara,  
ptgm.: ekskurso.

## EKZAMENOJ PRI ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Permeso instrui esperanton en publikaj lernejoj estis instigo organizi oficiale ekzamenojn pri ĝi. Tial nomis ministerio de instruado kaj popola klerigo ekzamenajn komisarojn ĉe „Ekzamenaj komisionoj por popolaj kaj civitanaj lernejoj“ en Praha (s-ron J. Eiselt, gimnazian eksdirektoron, ĉe la ĉeĥa, s-ron MUDr. A. Bischtzky, kuraciston ĉe la germana) kaj en Brno (s-ron Ing. V. Kroužil, profesoron ĉe la ĉeĥa kaj s-ron Ot. Leneška, direktoron de Komerca akademio ĉe la germana). Ili ekzamenas esperanton kiel fakultativan fakon ĉe civitanaj lernejoj. Unua ekzameno estis en majo 1921 ĉe la germana komisiono. De tiu tempo ĝis fino de la lernejjaro 1922/23 estis ekzamenitaj ĉe la ĉeĥoslovakaj komisionoj 28 kaj ĉe la germanaj 35 kandidatoj. Inter Ĉeĥoslovakoj estis: 15 instruistoj, 3 neinstruistoj kun alta lernejo, 10 neinstruistoj sen maturekzameno. Inter Germanoj estis 23 instruistoj, 5 profesoroj, 2 neinstruistoj kun maturekzameno, 8 neinstruistoj sen maturekzameno. — S. K.



## ĈEĤOSLOVAKIA TERITORIO DE U. E. A.

Marta cirkulero.

Januaro kaj februaro pasis — la plej vigla tempo el vidpunkto administra! Amaso da korespondajoj ĉiuspecaj, gazetoj, presajoj, ktp. venis, preskaŭ sama amaso estis forsendita. Ĉirkaŭ 1500 poŝtaĵoj! — La poŝtistoj kaj la leterpostistoj grumblis, la kolegoj miris, la familio min preskaŭ ne vidis... Haoso — sed nur ŝajna. Ĉio klasigita, enskribita, respondita, kalkulita kaj nun jam preskaŭ finita....

Tre instrue — precipe por ĉiuj dubemuloj — estus vidi tian laboramason. Ĝi montras parton de administra laboro de U. E. A. — la plej grava organizaĵo esperantista. Nur parton, ĉar temas nur pri unu el ĝiaj teritorioj.

Jen vidu: Ĉiutage venas membrolistoj, informoj, mendoj, demandoj, raportoj de diversaj delegitoj el ĉiuj partoj de nia lando. Ĉiu papero de mi ricevita prezentas finitan laboron faritan de individuo por la tuto... Pripensu iom! Kiom da intereso, kiom da amo al la laboro komuna estas necesa por atingi disciplinitan kunlaboron ĉe la 150 delegitoj kaj vicdelegitoj, kiuj tiom energie laboris kaj laboras! Ili apartenas al diversaj klasoj sociaj, ili plenumas diversajn okupojn kaj nur post sia taga laboro ili kun amo kaj fervoro sin dediĉas al sia funkcio delegita...

Ho vi skeptikuloj! Vidinte kaj spertinte la samon, kion mi vidis kaj spertis dum la lastaj du monatoj... vi certe konvertiĝus kaj kun mi konkludus: Kiom vigla, forta kaj vasta estas la movado, kies nura ero estas tia!

Mi sentas la devon tutkore danki al niaj delegitoj por ilia celscia, diligenta laboro! La teritoria aranĝo enradikiĝas iom post iom... Pli rapide ol mi mem supozis. — Delegitoj, kiuj ne uzante mian peradon rilatas senpere kun la Centra oficejo en Genève, estas jam nuraj esceptoj. Nature mi sentas la grandan respondecon kaj jam dum nia II-a kongreso en Liberec estos pridiskutotaj diversaj gravaj demandoj... Jam nun mi insistas, ke al la kongreso partoprenu la plimulto de niaj delegitoj!

Jen kelkaj rimarkoj administraj:

a) Februara „Esperanto“ elĉerpita! Mi petas la samideanojn, kiuj post tralego ĝin ne plu bezonas, sendi ĝin al mia adreso. Afrankon mi repagos.

b) La varbado de novaj membroj daŭras la tutan jaron — do ne nur la komencon de la jaro — kiel kelkaj delegitoj erare opiniis. — Varbu do daŭre kun plena energio! M = Kĉ 20.—, MA = Kĉ 45.—, MS = Kĉ 100.—. Premiojn ricevos nur MS!

c) Baldaŭ estos pretaj la leterpaperoj kaj kovertoj kun firmo de U. E. A. kaj ĝia emblemo oficiala. Delegitoj mendu ĉe mi kaj pagu kun la mendo por ĉiuj 100 kovertoj kaj 100 leterpaperoj Kĉ 20.—; afranko enkalkulita.

d) Krom oficialaj insignoj por membroj estas ĉe mi provizo de specialaj insignoj por delegitoj kaj vicdelegitoj por la sama prezo Kĉ 6.— por ekz.

e) Kiu deziras havi bonegan propagandilon „Dokumentaro pri Venezia konferenco“ (tekstoj esperanta kaj germanlingva), mendu ĉe mi. Prezo Kĉ 8.—. En Hradec Králové, la 15.-an de marto 1924.

O. Sklenčka, ĉefdelegito.

Ĉu vi jam estas U. E. A-ano?

## LINGVA FAKO

## PŘEKLAD III. TEXTU

## VÝSLEDEK

Doŝlo celkem 12 praci. Obtižný text celkem správně přeložili: B. Hoffmanová Praha, A. Jandík Pardubice a T. Mrázková Olomouc a dostanou odměnou knihu Pola Antologio, sbírku povídek, jež z polštiny přeložil Dr. K. Bein (Kabe).

La batalo kontraŭ perforto kaj subpremo -- ĝi vidiĝu<sup>1)</sup> en formo<sup>2)</sup> kiel ajn diversa: en regado<sup>3)</sup> de unu nacio super alia, en ekspluatado de unu klaso<sup>4)</sup> per alia aŭ en la senrajta<sup>5)</sup> maljustaĵo, praktikata<sup>6)</sup> de la pli forta super la malpli forta<sup>7)</sup> — estas ĉiam la plej bona lernilo<sup>8)</sup> de homoj kaj popoloj. Ĝi savas el<sup>9)</sup> malgrandeco kaj bagatelemo, el egoismo, ĝi senigas<sup>10)</sup> de la plej grandaj malvirtoj, mallaboremo kaj malkuraĝo, ĝi igas liberaj<sup>11)</sup> milojn da antaŭe dormetantaj fortoj, ĝi instruas virtojn, oferecon, sindonon kaj persistan laboremon, ĝi edukas al sentimo kaj kuraĝo, sakrifikas al heroeco kaj grandeco. La karakteroj, kiujn tia servado al eterna justeco hardis ĝis malmola ŝtalo, estas el la plej brilaj havaĵoj<sup>12)</sup> de la nacioj: ili estas neelĉerpebla (j) ĝojo kaj konsolo por ĉiuj, kiujn trafis la feliĉo<sup>13)</sup> vivi inter ili, ili estas la plej certa kompasoj kaj signoj de ĝusteco, kaj la vojoj de ili irataj estas la plej valora heredaĵo kaj forto por la posteuloj<sup>14)</sup>.

<sup>1)</sup> aperu, <sup>2)</sup> ne: simileco, <sup>3)</sup> zbytečně říkati *superregado* super iu, <sup>4)</sup> těž kasto, nikoli profesio, <sup>5)</sup> malprava, <sup>6)</sup> farata, <sup>7)</sup> fortulo super malfortulo, <sup>8)</sup> lernejo, <sup>9)</sup> senigas de, <sup>10)</sup> purigas, <sup>11)</sup> liberigas, vekas, <sup>12)</sup> posedaĵoj, <sup>13)</sup> kiuj havis la feliĉon, <sup>14)</sup> posteularo.

## V. TEXT K PŘEKLADU

**Vzdělávaje sebe dál, veď tak i své děti.** Ne-shromažďuj pro ně peníze, ale neľituj také posledního krejcaru na jejich vzdělání. Nauč je býti hrdými, ale jen na toto vzdělání ne na postavení, ne na titul. Ať budou potom čímkoli děti tvoje — ať nesou v každém postavení to hrdé vědomí svého „já“, a věř, že potom žádná práce je neponíží, žádný stav, jenž jim má dávat živobytí, nebude se jim zdáti méněcenným. Vzdělání tvých dětí budí nejdražším dědictvím, které zanecháš svým synům a nejpěknějším věnem, které obdrží tvé dcery.

J. S. Machar.

Účinné pomůcky propagační budou letáky: „Esperanto — jednotné jazykové pojítko národů“ (právě vyšlo) a „Krátký kurs esperanta na jednom listě“ (vyjde začátkem dubna). Objednávky přijímá administrace čas. „La Progreso“ (cena prvního letáku: 1 kus 20 hal., 100 kusů 15 Kč, 500 kusů 40 Kč; cena letáku druhého: 1 kus 50 hal., 100 kusů 40 Kč, 500 kusů 150 Kč). Opatřte všem svým známým neesperantistům! Rozšiřujte ve školách, spolicích, knihovnách, na schůzích, ve veřejných místnostech, všude!



## BIBLIOGRAFIO

**Esperantský zpravodaj** (Esperanta raportanto). Redaktis kaj eldonis *Julie Šupichová* (Praha 2030-II.). Tri jarvolumoj (1920/23) po 10 numeroj (I. 3 Kč, II. 3 Kč, III. 5 Kč). — *Fraŭlino Šupichová* havis bonan ideon eldonadi nacilingvan gazeton kun klarigoj pri nia afero kaj kun raportoj pri nia movado, por ke kiel esperantistoj tiel ankaŭ neesperantistoj estu ĝuste informataj pri la stato de la esperantismo. Sian taskon ŝi bone plenumis kaj en tri jaroj (1920/23) ŝi kolektis riĉan materialojn kaj dokumentojn. Ŝia gazeto estis abonata kaj legata de la esperantistoj, sed ĝi ne penetris en rondojn neesperantistajn kiel la fondintino esperis. Tiu ĉi cirkonstanco kaŭzis, ke F-ino Šupichová finis la eldonadon malgraŭ bona financa stato de la gazeto. Kaj ni ĉiuj devas riproĉi al ni mem, ke ni malmulte penis vastigadi la gazeton ekster nia rondo. Ni vastigadu almenaŭ la kompletajn volumojn!

**Bulgara antologio.** S-ro *Krestanoff* preparis kaj baldaŭ presigos ampleksan verkon ilustritan: Bukedon de la bulgara literaturo-prozaĵoj kaj poeziaĵoj de 40 bulg. geverkistoj, kun biografiaj notoj kaj portretoj de 1 aŭtoroj, por konatigo de la bulgaraj naciaj ĝojoj kaj malĝojoj. Ĉiu antaŭpaginto de almenaŭ 2.50 g. Mk aŭ 3 sv. fr. ricevos la libron afrankite. La nomoj de la antaŭpagintoj de pli ol 4 gMk aŭ 5 sv. fr. estos danke presitaj en la liston de la monhelpintoj en la fino de la verko mem. Ĉiuj estas bonvenintaj! Ĉion adresu al: Ivan Krestanoff, Wintergartenstr. 9, Dresden-A. 16, Germ. aŭ al la adm. de La Progreso.

## KRONIKO EL ĈEĤOSLOVAKIO

Oficiala raporto de Ĉsl. Asocio Esp.  
laŭ senditaj informoj.

**Novaj kursoj.** En *Nymburk* S-ro Klůz komencis kurson por 19 komencantoj. — En *Brno* Dro Barviř gvidas kurson por 20 membroj de Cizinecký Svaz (Turisma Asocio). — En *Třebíč* gvidis kurson por 14 komencantoj S-ro prof. Em. Jireček. — En *Podčáplý* ap. Beroun kurson por 11 komencantoj aranĝis Loka Kultura Komisiono kaj gvidis ĝin S-ro instruisto Ráž. — En *Hranice* (Moravio) S-ro Bryndač instruis 30 p. en la kurso aranĝita de Metiista Societo.

**Novaj kluboj.** En *Třebíč* (Moravio) fondiĝis Esperanta Rondeto de gimnazianoj. (36 m.) Kunvenoj merkrede kaj sabate en la gimnazio. Prez. Rud. Dokoupil, sekr. F-ino Kotačková Růžena, stud. en Třebíč, gimnazio.

En *Beroun* la klubo post sia reorganizo aliĝis al ĈAE. Prez. A. Ráž, instruisto, sekr. Jelínek Josef. Kunvenoj jaŭde en la rest. „Na nově“.

En *Hranice* (Moravio). E. K. fondiĝis la 18. januaro. Prez. D-ro O. Levý, sekr. Ant. Bryndač, komercisto. Kunvenoj merkrede en la vinvendejo Kufř, náměstí.

**Laboristaro kaj esp.** La monata revuo *Vychovatel* (Edukanto), organo de soc. dem. Asocio de La-

boristaj Gimnastaj Grupoj (DTJ) subtenas esp-on publikigante en ĉiu n-ro *kurson* de esp. redaktitan de vigla sam-o J. Pech en Plzeň.

**Katolikoj kaj esp.** La Esp. Sekcio de la Societo de Katolikoj en ĈSR. aranĝis la 21. Februaro en monaĥinejo de St. Anna (Praha II. Jenštenská 27) paroladon de S-ro Koutek: Pri la pacifisma movado (30 p.). La kunvenoj okazas ĉiun duan jaŭdon, gvidate de F-ino L. Plzeňská, en la citita ejo.

## REGIONAJ KUNVENOJ

**Regiona kunveno de nordmoraviaj esperantistoj** okazos la 6. de Aprilo en Olomouc Y. M. C. A. Programo: Antaŭtagmeze: labor-kunveno k. propaganda parolado; posttagmeze muziko, lumbilda parolado en esp. pri Konstantinoplo, recitaĵoj. Venu multnombre. Eventualajn dezirojn adresu al esp. Societo Olomouc.

**Al Okcidenta Bohemio!** La regionaj kunvenoj aranĝataj kvarfoje en la jaro montras sin ĉam pli utilaj donante precipe al disaj, izolitaj samideanoj la eblecon de esp-a konversacio kaj de interkonatigo. Ĉar la aranĝantoj ne konas ĉiujn adresojn, la subskribinto petas, ke ĉiuj samideanoj de Bohemia Okcidento sciigu lin pri siaj adresoj, por ke li povu informi ilin pri aranĝo de la venonta regiona kunveno. Jos. Přibáň, Plzeň V. Táborská 3.

## LOKAJ RAPORTOJ

**Olomouc:** La Esperanta Societo okazigis la 6./3. ĝeneralan kunvenon en restoracio Štěpánek. La nova komitato: prez. A. Kudela, sekr. F. Hochman, kas. J. Štěrba, komit. R. Eisler, J. Mastný, A. Neužil, E. Wolf; vicomit. L. Augustynová, J. Morav; reviz. Blažek J., Štancl J. La 2./3. ĉeestis 24 ges-anoj la radiotelefonan koncerton k. paroladon de S-ro Pitlík Praha pri Frideriko Smetana, kiuj estis bona aŭdeblaj.

**Přerov:** La 2. ĝen. kunveno, okazinta la 6. Februaro elektis: prez. S-ro Malik Ad., vicpr. prof. Pittner Th., sekr. S-ino A. Grauerová. Kunvenoj merkrede je la 7a en Akciový pivovar.

## ESPERANTISTA VIVO

## EDZIĜOJ

— F-ino Božena Veselá el Jaroměř (Ĉeĥosl.) kun s-ro Ivo Onyščenko el Kiev (Ukrainujo).

— S-ro Vojtěch Venský, membro de U. E. A. en Olomouc kun F-ino Anička Kuchařová.

Koran gratulon!

La legantoj pardonu la malfruigon de tiu ĉi numero, kaŭzitan de tio, ke la aŭtoroj promesintaj verki artikolojn pri Smetana, Sová kaj Machar, ne sendis ilin. — Pro manko de loko oni devis mallongigi kaj prokrasti kelkajn rubrikojn!

La venonta numero aperos la 28. Aprilo kaj enhavos raportojn pri la konferenco en Genève!

## OFICIALA INFORMILO

de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista  
Praha-VII. Sochařská 333.

### LA V. ĜENERALA KUNVENO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Ĝi okazis la 23. Marto 1924 en Praha-III., kafejo Opera Partoprenis 53 membroj, reprezentantaj 141 membrojn el 12 lokoj: Český Brod 1, Hradec Králové, ĉeestis 5 m. kun 11 voĉoj, Jaroměř 1, Kosmonosy 1, Kralupy n./Vlt. 1, Ml. Boleslav 1, Nymburk 3 m. (11 v.), Pardubice 1, Plzeň 1 (31), Praha 35, Pĕroř 1, Ústí n./Orl. 3 (38 v.). Prezidis S-ro Eiselt, protokolis S-ro Dobeš.

Por ŝpari la tempon por la debato pri diversaj proponoj, la kunveno akceptas la proponon de S-ro Skleněka, ke la protokolo de la lasta kunveno estu akceptita nelegite kaj ke la funkciuloj prezentu siajn raportojn mallongigite.

Gen. sekr. S-ro Hromada legas raporton pri agado de ĈAE en la pasinta jaro kaj S-ro Ginz prezentas raporton pri la agado de la Propaganda Sekcio (vidu la venontan n-ron de la Progreso). Ambaŭ raportoj estas aprobitaj. La kunveno konsentas kun la laŭdaj vortoj diritaj de S-ro Pitlik pri la laboro de S-ro Ginz.

S-ro Hromada legas la raporton pri la Ekzamena Komisiono de ĈAE, senditan de D-ro Kamaryt. La Komisiono kunidis dum 1923 unufoje (28. Septembro) kaj ekzamenis 6 personojn.

S-ro Janoušek prezentas raporton pri financoj dum 1923 (venonta n-ro).

S-ro Weisskopf (Praha) akcentas ke ĈAE elspezis 7000 Kč por propagando kaj demandas, kiam planon havas la komitato por havigi similan sumon, bezonotan en 1924.

Oni prokrastas la aferon ĝis la koncerna punkto de la programo. S-ro Kraus kiel prez. de la Kontrola komisiono raportas, ke la financajn librojn li trovis en ordo. Ĉar pro manko de tempo ne estis eble prezenti la financon raporton por revizo al alia revizoro, la kunveno kontentiĝas kun unu revizoro kaj akceptas lian raporton.

Elektado de nova komitato: La prezidanto informas, ke kelkaj membroj ne deziras esti reelektitaj, ĉar ili ne povas veturadi al Praha por partopreni la kunvenojn. Li deklaras, ke en tiu okazo sufiĉas almenaŭ laboro por ĈAE el ilia loko kaj sendado de informoj al Praha. Per varmaj vortoj li dankas al S-roj Skleněka kaj Pitlik, kiuj ne deziras esti elektataj, la unua pro troa laboro en UEA, la alia en Ĉ.S.E.-Instituto. S-ro Skleněka deklaras, ke lia kaŭzo estas la neebleco pagi la elspezojn de partopreno en la komitatataj kunvenoj, kiun li opinias nepre necesa kaj deviga por ĉiu komitato. — S-ro Hromada diras, ke oni planis sendadi al ĉiuj komitatanoj informon pri traktotajtoj, sed necesas skribi ĉiam 25 leterojn. Tio estas neeble pro manko de helpantoj. — La prez. interrompas la kunvenon kaj invitas la interesantojn al la estrado por starigi la liston de la nova komitato.

Post rea malfermo de la kunveno, estas antaŭlegata la listo de kandidatoj. La prez. klarigas, ke la kresko de la Asocia laboro necesigas, ke la komitaton eniru kelkaj membroj, eble ne malnovaj nek maljunaj, sed fervoraj kaj pretaj labori. Tiam sub

gvido de la restintaj antaŭaj komitatanoj la laboro de la Asocio povos esti plenumataj rapide kaj plene. Post debato kaj malgranda ŝanĝo la listo estas unuanime aprobita kaj la komitato elektita jene: Prezidanto S-ro Eiselt Josef, gimnazia eksdirektoro, nun en la ministerio de instruado; membroj de la komitato: D-ro Stan. Kamaryt, profesoro en Bratislava, S-ino B. Keyzlarová, Cervený Kostelec, Ant. Kudela, Olomouc, plue el Praha: Fryml, fabrikeja oficisto, O. Ginz, oficisto, R. Hromada, oficejestro, Janoušek Jan, asekur-oficisto, Mothejzik Fr., poŝtoficisto, Novák Fr., horloĝisto, Schmidt Mil., ministeria konsilanto de financa min., Šupichová J., faka instruistino; vickomitato: Bastl, Sl. Ostrava, S-ino Grauerová, Pĕroř, S-ino Grossmannová-Vamberová, Pardubice. F-ino Janalíková, Bystrice p. Host., S-ro Klůz, Nymburk kaj S-ro Vojtěch, Hradec Králové. Kontrola komisiono: membroj Drvota, Domažlice, komercisto, Procházka Karel, konsilanto Praha, Ráž, instruisto, Beroun. Schmiedt, elektristo, Nové Zámky, Votrubec, supera poŝtoficisto, Plzeň.

Anstataŭantoj: Loveček, oficisto en Třebíč, S-ino Velebilová en Ústí n. Orl. kaj S-ro Zöllne, grandkomercisto en Brno.

S-ro Skleněka deziras sukceson al la nova komitato, trovas bona, ke novaj personoj estis enprenitaj kaj rekomendas, ke ili konatiĝu kun la laboro Asocia por povi iam transpreni la tutan laboron.

Liberaj proponoj: La gen. sekr. prezentas la proponon de la komitato, ke ĉiu membro de ĈAE pagu krom sia kotizo 2 Kč jare por K. R. (Konstanta Reprezentantaro) zorganta pri niaj centraj institucioj. Alia propono venis de la Amika Rondo en Nové Zámky, ke la sumo de 2 Kč pagata de la kluboj por ĉiu membro al Asocio estu duobligita.

S-ro Skleněka proponas simpligi la pagadon de kotizoj tiamaniere, ke de ĉiuj membroj — klubaj kaj izolitaj — ĈAE ricevu la saman sumon, pagotan per unufojo, ekz. 16 Kč. — Prof. Smeták el Hradec Král. ankaŭ deziras plialtigi kotizon. Kolektado de 1 Kč monate ŝajnas al li nedigna procedo. — S-ro Weisskopf, Praha, konstatas mankon de financa plano kaj budĝeto. La kotizo 2 Kč ŝajnas al li bagatela, tute nesufiĉa kaj absolute nekapabla por akceli venkon de nia afero. — Klubo en Ústí n. Orl. prezentas skriban proponon: ĵiksi certan sumon, per kiu oni estus membro de ĈAE kaj UEA kune. Oni petas reprezentantojn de aliaj kluboj esprimi sian opinion pri la kotiza problemo. S-ro Malík, Pĕroř, rekomendas, ke kluboj novaj, en la unuaj 2 jaroj de sia ekzisto estu liberigitaj de la devo pagi kotizojn al ĈAE. Oni rimarkigis ke ĝuste la novaj kluboj fervore kaj precize plenumas siajn devojn financajn. — S-ro Přibáň (Laborista Grupo Plzeň V.) atentigas, ke lia klubo, konsistanta el laboristoj, ofte senokupaj, ne povus pagi pli ol 24 Kč jare.

S-ro Skleněka klarigas la aferon kaj akcentas, ke la plialtigo fakte ne ekzistas por tiuj, kiuj laŭorde pagis la propagandan imposton. La proponata kotizo 16 Kč enhavas: 2 Kč ĝis nun pagitajn, 12 Kč propaganda imposto, ĝis nun pagata, 2 Kč por K. R., la sola plialtigo, sed iranta al centraj institucioj internaciaj, ne al ĈAE. La diferenco estas do, ke la propaganda imposto deklariĝus deviga. En la nea okazo, ankaŭ dum la nuna jaro la manko de financoj malhelpos ĉiun pli vigan progreson.

S-ro Weisskopf Praha trovas necesa la plialtigon. Idealismo estas bona afero, sed ni estus

malbonaj idealistoj, se ni ne donus materialajn rimedojn por realigo de nia idealo. La movado en nia lando forte antaŭeniris, se ĈAE povus pagi sian oficiston, kiu laborus regule ĉiutage almenaŭ unu du horojn.

La k a s i s t o atentigas, ke por konto de propagando imposto ĈAE enspezis dum 1923 sole 1600 Kč anstataŭ 10.000 Kč.

S-ro M a l i k Pŕerov opinias, ke multaj membroj ne volos pagi la kotizon, eĉ se la ĝenerala kunveno voĉdonos ĝin.

S-ro S k l e n ĉ k a respondas, ke idealismo sen oferemo valoras nenion. La ĉeestantaj reprezentantoj devas klarigi la aferon en siaj kluboj.

S-ro H r o m a d a resumas do la debaton kaj formulas la proponon: La kotizo 2 Kč por klubaj membroj restas, la propaganda imposto estas deklarita kiel deviga parto de kotizo, la 2 Kč estu pagataj por K. R. sekve de tio *la kotizo por 1924 estu 16 Kč por ĉiu membro, kluba aŭ izolita.*

La propono estas akceptata per ĉiuj voĉoj kontraŭ unu. S-ro G r o s s m a n n o v á Pardubice deklaras por sia persono konsenton kun la ĵus akceptita propono, sed laŭ komisio de la prez. de ŝia klubo ŝi devis voĉdoni kontraŭ. Klariĝas, ke la Klubo Pardubice jam nun akceptas de siaj membroj 24 Kč jare. La afero estus solvebla, se la klubo kotizo estus malaltigita. Kluboj havas ja aliajn eblecojn havigi al si monon (aranĝo de amuzaj vesperoj k. s.)

Klubo en Ŭstí n. Orl. proponas, ke varbado de membroj estu organizita laŭ distriktoj (ĵupy). Ĉiu klubo zorgus ke ĉiuj samideanoj ne nur en ĝia urbo, sed en la tuta regiono, estu organizita en ĈAE. Post detala debato la kunveno komisias la klubon en Ŭstí n. Orl., ke ĝi realigu la aferon en sia ĵupa kaj donu raporton pri la rezultato.

Esp. Rondo Amika en Nové Zámky proponas interveni en la afero de esp. instruado en la komercaj lernejoj. Transdonita al la komitato.

Laŭ propono de E. K. Ŭstí n. Orl. ĈAE intervenos, ke la L. K. K. en Wien pilongigu la tempolimon por neplialtigataj aliĝoj. (Intertempela L. K. K. mem fiksas novan daton 31. Majo.)

S-ro Sklenĉka rekomendas aboni oficialan organon de ĈAE, La Progreso, kiu ĝenerale plaĉas.

La kunveno finiĝis je la 14:20 horo. Ĝi estis unu el la plej sukcesaj kunvenoj de ĈAE. Vigla, objektiva debato, viva intereso pri aferoj de ĈAE. Spite la neloga temo financa, kiu estis ĝia ĉefa parto, sole negranda parto da membroj foriris antaŭ la fino.

**Príspevky Svazu na r. 1924** zaplatily kluboj [kromé již jmenovaných klubů Praha (62), Pŕerov (62), Ŭstí n. O. (38), Orlová (25), Pardubice (5), Holešov (10), Bystřice p. H. (14)]: Nové Zámky (10 čl.), Hranice (25), Benešov (7), Pardubice (7), Plzeň V. (31), celkem 11 klubů za 296 členů, kromé toho 26 izoluloj; celkem tudíž 322 členů (850 Kč).

**Propagační daň:** Do 20. března platili: E. K. Nové Zámky 10,—, E. K. Bystřice p. H. 20,—, Ŭstí n. Orl. 38,—, Olomouc 100,—, Benešov 12,—, Plzeň V. 20,—, Rádek, Turnov 10,—, Cikhardt, Praha 15,—, Friedrich, Košice 12,—, Marelová, Dobruška 12,—, Dr. Šil, Kolín 12,—, Halada, Chloumek 12,—, Rajchlová, Dobrá 12,—, Jireček, Třebíč 5,—, Střihavka, Motyčín 12,—, což činí s výkazem v č. 4. dohromady 411 Kč.

## PROPAGAČNÍ ODBOR

**Názvy léků v esperantu.** Komise pro lékárnické názvosloví, jež byla ustavena r. 1922 Mezinárodní federací farmaceutů, vydala nyní zprávu o své činnosti, v které vedle odborných latinských termínů jest položen všude esperantský překlad. Jako vůbec při vědeckých termínech, ani zde v lékárnictví nepůsobil esp. překlad nijakých obtíží. Mezinárodnost slovních kmenů v esperantu učinila tuto věc snadnou. — Touto novinkou bude snad konečně dosaženo zpopularisování znalosti léků, jejichž názvy jsou dosud většinou tak nejasné.

**Encyklopedický slovník esperantský,** jenž bude obsahovati celý slovní poklad mezinárodního jazyka, se všemi odbornými výrazy, s mnoha vysvětlivkami a příklady a s přesným překladem do němčiny, počal nedávno vycházeti v Lipsku v esperantském oddělení velkého nakladatelství Ferd. Hirt & Sohn. Z objemného prvního svazku o XXIV. a 135 stranách (celý slovník vyjde asi v 8 takových svazcích), možno souditi, že jest toto dílo řídkou ukázkou slovníku vědecky vypracovaného do posledních detailů. Slovník byl sestaven Eug. Wüsterem a byl uvítán s radostí znalci esperanta a potěší srdce vůbec každého filologa. Jest nyní povinností všech přátel mezinárodního jazyka umožniti čtenou subskripci vydání i dalších svazků. První díl stojí 105 Kč, další dva díly budou za 3 americké dolary a budou dány do tisku, jakmile se sejde dostatečný počet přihlášek se současným složením této částky. Obstará též adm. Progresu (Praha VII., 333)

**Francouzský politik o esperantu.** Lyonský starosta Herriot, jenž hraje důležitou úlohu ve francouzské politice, se veřejně vyslovil, že podle jeho mínění nutno podporovati rozšíření esperanta, které jest důležitou pomůckou k umožnění mezinárodních styků. Ve Francii byla část politiků dosud esperantu dosti nepřívětivá, ač vědecký svět francouzský již dávno se činně účastní na propagaci tohoto jazyka.

**Vědecký kongres o esperantu.** Mezinárodní vědecký kongres k usnadnění obchodních styků, jenž se konal za předsednictví lyonského starosty Herriota, předního francouzského politika, začátkem tohoto měsíce v Lyonu, odhlasoval resoluci, jež doporučuje k podpoře světového obchodu užívání esperanta.

## ESPERANTA GRAMATIKO SUR POSTKARTO

ricevebla ĉe R. Fridrich, Královo Pole, Purkyňova 79. **Nur kontante!**  
10—3 Kč, 50—12 Kč, 100—20 Kč, 500—80 Kč,  
1000—110 Kč. Petu specimenon kaj ĉekon;  
Lernejoj rabaton!

**Opatřime Vam následující knihy:****SPISY ZAMENHOFOVY:**

Fundamento eldono 5 lingva . . .	Kč 6.—
Fundamento, kun ĉeĥa trad. . . .	„ 3.—
Fundamenta Krestomatio 460 str. . . . .	„ 16.—
Fabeloj de Andersen . . . . .	„ 12.—
Georgo Dandin . . . . .	represata
Hamleto, Shakespeare, 170 str. . .	„ 12.—
Ifigenio, Goethe, 108 str. . . . .	Kč 12.—
Proverbaro esperanta, 82 str. . . .	„ 6.—
Rabistoj, Schiller, 144 str. . . . .	„ 8.—
Revizoro, Gogol, 100 str. . . . .	„ 8.—
Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia, esp-france . . . . .	disvendita

**ZAMENHOFOVY PŘEKLADY BIBLE:**

Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmonoj po . . . . .	Kč 6.—
Psalmaro, reeldonota en Anglio . .	—.—
Sentencoj de Salomono . . . . .	„ 4.—
Predikanto . . . . .	„ 2.—

**DÍLA DRA K. BEINA (KABE):**

Faraono, Bol. Prus, 3 sv. 600 str. po	„ 10.—
Fundo de l' mizero, Sieroszewski . .	„ 3.—
Pola Antologio, krátké povídky . .	„ 6.—
Halka, opera, text . . . . .	„ 4.—
Interrompita kanto . . . . .	„ 3.—

**VZORNÁ DÍLA JINÝCH AUTORŮ:**

Mazepa de Slowacki, tr. Grabowski	Kč 6.—
Kaatje de P. Spaak, 111 str. . . . .	„ 8.—
Karmen, novelo de Mérimée . . . .	„ 4.—
Reĝo de la montoj, napínávy román ilustr., 248 str. . . . .	„ 16.—
Imenlago, novelo de Storm . . . . .	„ 3.—
La kvar evangelioj en unu rakonto, 200 str. . . . .	„ 6.—
Fatala ŝuldo, román 318 str. . . . .	„ 10.—
Salome de Wilde . . . . .	„ 2.—
Rakontoj de Arbes, 135 str. . . . .	„ 6.—
Koboldo Ondra, Mahen . . . . .	„ 5.—
Ĉeĥa literaturo. Dr. Novák Arne . .	„ 8.—
Tra la mondo II. ĉitanka . . . . .	„ 10.—
Bukedeto, 7 povídek, 48 str. . . . .	„ 4.—
La Esperantisto en Germanio . . . .	„ 20.—
Moravia karsto . . . . .	„ 5.—

**SLOVNÍKY:**

Tittl: Vortaro esp. ĉeĥa (váz. 7·50)	Kč 5.—
Kühnl-Procházka: Slovník ĉesko-esp. . . . .	„ 20.—
Kabe. Enciklopedia vortaro, 175, váz.	„ 16.—
Verax: Vortaro (techn. slova) váz.	„ 20.—
Boirac: Plena vortaro esp. 3 sv.	„ 22.—
Wüster: Maŝinfaka vortaro . . . . .	„ 15.—

Kamaryt: Jazyk mezinárodní . . . .	Kč 8.—
Kotzin: Na obranu esperanta . . . . .	„ 3.—
Šupichová: Učebnice esp. . . . .	„ 9·60
Žďárský: Učebnice esp. . . . .	„ 20.—
Bouška: Škola esperanta, úplná . . .	„ 30.—

Obstaráme za předem zaslany obnos plus 10 procent porta, mimo daně z obratu.

**LA PROGRESO, Praha VII., Sochařská 333.**

**PRO KURSY A KLUBY**

opatiťe si

**SLOVNÍK ESPERANTSKO-ĀESKÝ**

od B. Tittla s krátkou mluvnici.

Stran 67.

Brož. za 5 Kč, pěkně vázaný 7·50 Kč. - Při  
objednávce aspoň 10 exempl. 10% sleva.

**ADMINISTRACE PROGRESA**

PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Doplňte si scházějící Vam

**spisy Zamenhofovy***Snížené ceny!*

Fundamento de esperanto . . . . .	Kč 3.—
Esenco kaj estonteco de la L. I teksto franca kaj esp. . . . .	„ 2.—
teksto ĉeĥa . . . . .	„ 2.—
Fundamenta Krestomatio. Dika libro 460 p. . . . .	„ 16.—
Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare . . . . .	„ 6.—
Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe . . . . .	„ 12.—
Proverbaro esperanta . . . . .	„ 6.—
La Rabistoj, dramo en kvin aktoj de Schiller . . . . .	„ 8.—
La Revizoro, komedio en kvin aktoj de Gogol . . . . .	„ 8.—
Fabeloj de Andersen. Plena kolekto .	„ 12.—

Celá kolekce 70 Kč vyplaceně. Na jednotlivá díla 10  
procent exp. výloh, a porta. Proti předem zaslánému  
obnosu. Žádejte složenku. Obstará

**ADMINISTRACE PROGRESA Praha-VII. Sochařská 333.****TRADUKOJ EL LA ĀEĤA LITERATURO**

Arbes J.: Rakontoj. Trad. J. Grňa 135 p.	Kč 6.
Novák Arne: Āeĥa literaturo el la birda perspektivo. Trad. V. Kroužil 58 p. . . . .	Kč 8.
Dr. Novák Jan: Johano Amos Comenius. Trad. Rondeto de esp. Kun antaŭparolo de Dro Kama- ryt. 27 p. . . . .	Kč 5.
Mahen J.: Koboldo Ondra. Trad. Mo- raviaj pioniroj. . . . .	Kč 5.

5 Kč = 1 sv. fr. Mendu ĉe

**ADMINISTRACIO DE PROGRESO Praha-VII. Sochařská 333.**

Postulu pagilon de la pošta ĉekoficejo aŭ  
sendu monon en rekomendita letero.